*i.* —necropoli, cimitero.
*f.* —nécropole, cimitière.
*a.*—necropolis.
*g.*—Nekropolis.

*Tombarejo similanta, pro siaj vojoj k. konstruaĵoj, urbo de mortintoj.*


**Neptun**o.—*Gr.* Posejdon; *l.* Neptunus.



*h.*—Neptuno.
*p.*—Neptuno.
*i.* —Neptuno.
*f.* —Neptune.
*a.*—Neptune.
*g.*—Neptun.

*Dio de la maro ĉe la romanoj, filo de Saturno k. Gea, edzo de Anfitrita, ikonografie reprezentita, kiel la greka Posejdo, per viro kun tridento sur mara ĉaro.*


**Nervur**o.—*El gr.* neur (*nervo*); *l.* nervus.



*h.*—nervio, nervadura.
*p.*—nervo.
*i.* —nervature.
*f.* —nervure.
*a.*—nervure, rib.
*g.*—Rippe, (*Nerv.*)

*Arkaĵo, formanta kun aliaj reton por subteni panelitan volbon. Elstara cilindreto, prismo, alo, ĉe iu ajn surfaco.*

**Niĉ**o.—*El gr.* mis (*konko*).



*h.*—nicho, hornacina.
*p.*—nicho.
*i.* —nichio, nicchia.
*f.* —niche.
*a.*—niche.
*g.*—Nische.
*pol.*—nisza.
*r.*—niŝa.
*sv.*—nisch.

*Regula kavaĵo en muro por enmeti k. elmontri statuon, vazon, k. c.*

**Niel**o.—*L.* nigellus, *el* niger (*nigro*).



*h.*—nielo.
*p.*—nielo.
*i.* —niello.
*f.* —nielle.
*a.*—niello.
*g.*—Niello.

*Smalto nigreblua, farita per arĝento k. plumbo fanditaj, en metalaĵo ĉizita.* —i = *Ornami per nielo.* —isto ; —arto ; —ado.


**Nimbo**. — *El l.* nimbus (*nubo, aureolo*).



*h.*—nimbo.
*p.*—nimbo.
*i.* —nimbo.
*f.* —nimbe.
*a.*—nimbus.
*g.*—Nimbus.
*pol.*—nimb.

*Rondaĵo servanta kiel hela fono de la kapo de iaj ikonoj. Cirklo havanta gravuritan gradaron, tre uzata de topografiaj instrumentoj.*


**Nivelo**.—*L.* libella, *el* libra (*egalpezo, nivelo*).



*h.*—nivel.
*p.*—nivel.
*i.* —libello.
*f.* —niveau.
*a.*—level.
*g.*—Niveau.
*sv.*—niva.

*Alteco de io rilate difinitan surfacon.* —i=*Horizontaligi ion laŭ dezirata nivelo; trovi la nivelon de punkto aŭ punktaro.* —ilo=*Ilo por determini ĉu estas horizontala linio aŭ ebeno* : (aerbula—, tub—, mason—...).
—linio=*Samnivela linio.*

**Nodo**.—*L.* nodus (*nodo*).



*h.*—nodo, nudo.
*p.*—nó.
*i.* —nodo, nocchio.
*f.* —noeud.
*a.*—knot.
*g.*—Knoten, Knorren.

*Punkto kie konverĝas, kunkruciĝas aŭ kunligiĝas fadenoj, ŝnuroj, stangoj, arbobranĉoj, k. c.* Simpla—, duobla—, masonista—, marista—, teksista—...

**Numismatiko**.—*El gr.* numisma (*monero*) ; *el* nomos (*nomo*) ; *l.* numisma.




*h.*—numismática.
*p.*—numismática.
*i.* —numismatica.
*f.* —numismatique.
*a.*—numismatic, numismatology.
*g.*—Numismatik.

*Parto de la arkeologio pritraktanta la monerojn k. medalojn, speciale laŭ ilia arta k. historia aspekto. La tri ĉefaj serioj de la antikvaj moneroj estas la grekida, la semida k. la romanida. Pli uzataj nomoj* : drakmo (bi—, tetra—, heksa—, okta—, deka) ; obolo (hemi—, trihemi—, dek—...) ; statero= 20 drakmoj (bi—, tetra—, penta—...); aso, denaro, floreno, soldo, aŭreo...



# O

**Obelisk**o.—*Gr.* obeliskos, *el* obelos (*pinglo*); *l.* obeliscus.



Obeliskoj antaŭ egipta pilono.

*h.*—obelisco.
*p.*—obelisco.
*i.* —obelisco.
*f.* —obélisque.
*a.*—obelisc.
*g.*—Obelisk.
*pol.*—obelisk.

*Alta, prisma monumento finita per pinta piramideto; ofta en Egipto.*

**Obol**o.—*Gr.* obolos, *el* obelos (*pinglo, broĉo, monero*); *l.* obolus.




Tri-obolo fenica de Gadeks (Hisp.)

*h.*—óbolo.
*p.*—obolo.
*i.* —obolo.
*f.* —obole.
*a.*—obol.
*g.*—Obol, Obolus.
*pol.*—oblo.

*Antikva bronza monereto greka, kies pezo k. valoro estis* $^1/_6$ *de la drakmo.* Du—, tri—, tetra—, hemi—, trihemi—.

**Observatori**o. — *L.* observatorium, *el* observare (*observi*).



*h.*—observatorio.
*p.*—observatorio.
*i.* —osservatorio.
*f.* —observatoire.
*a.*—observatory.
*g.*—Observatorium.
*pol.*—obserwatorjum.

*Scienca observejo por astronomiaj studoj.*

**Odeon**o.—*Gr.* odeion, *el* ode (*kanto*); *l.* odeum.




Odeono de Parizo.

*h.*—odeón.
*p.*—odeón.
*i.* —odeo.
*f.* —odéon, odeum.
*a.*—odeion, odeum.
*g.*—Odeon.

*Speciala teatro por koncertoj, kanto, muziko. Periklo konstruigis la unuan en Ateno.*

**Ogiv**o. — *L.* augiva, *el* augere (*kreski, grandigi*).



*h.*—ojiva.

*p.*—ogiva.

*i.* —ogiva.

*f.* —ogive.

*a.*—ogive, ogee.

*g.*—Spitzbogen, (ogival).

*Arkaĵo konsistanta el du arkoj formante angulon.* Lancoforma—, akuta—, ekilatera—...

**Okastil**o. — *El gr.* okto + stilos (8 *kolonoj*) ; *l.* octastylos.



Okastila greka templo. (La partenono).

*h.*—octástilo.

*p.*—octastylo.

*i.* —octastilo.

*f.* —octastyle.

*a.*—octastylos.

*g.*—Oktastilon.

*Konstruaĵo havanta antaŭ la fasado okkolonan vicon.*

**Ole**o.—*L.* oleum (*oleo*).



Oleo-pentraĵo.

*h.*—aceite, óleo.

*p.*—oleo, azeite.

*i.* —olio.

*f.* —huile.

*a.*—oil.

*g.*—Ol.


*pol.*—olej.

*Grasa fluidaĵo el vegetaĵa, minerala aŭ animala origino, uzata por arto, industrio, lumigado, nutrado, k. c.*

—pentro = *Pentro farita per farboj solvitaj en oleo; elpensita en la 14ᵃ jc.*

—grafio = *Arto presi per oleaj koloriloj.*

**Opistodom**o.—*El gr.* opisthaton + domon (*malantaŭa konstruaĵo*); *l.* opistodomus.




Opistodomo. en plano de antikva greka templo.

*h.*—opistodomo.

*p.*—opisthodomo.

*i.* —opistodomo.

*f.* —opisthodome.

*a.*—opisthodomos.


*g.*—Opisthodomos.

*Malantaŭa parto de la grekaj temploj, kie oni konservis oferaĵojn, valoraĵojn.*

**Or**o.—*L.* aurum (*oro*).

Au

Ĥemia simbolo de la oro.



Heraldika esprimo de la oro.

*h.*—oro.

*p.*—ouro.

*i.* —oro.

*f.* —or.

*a.*—gold.

*g.*—Gold.

*Flava, valorega metalo, uzata por artaj k. riĉaj juveloj, medaloj k. moneroj.* —umi, —umisto, —aĵisto.

**Oratori**o.—*L*. oratorium, *el* orare (*preĝi*), *el* os, oris (*buŝo*).



*h.*—oratorio.
*p.*—oratório.
*i.* —oratorio.
*f.* —oratoire.
*a.*—oratory.
*g.*—Oratorium.

*Endoma kapelo; privata kapelo aŭ altareto.*

**Ord**o.—*L*. ordo (*ordo, dispono*).



Komposita ordo.

*h.*—orden.
*p.*—ordem.
*i.* —ordine.
*f.* —ordre.
*a.*—order.
*g.*—Ordnung.

*Dispono k. proporcio de arkitekturaj elementoj.* Dorika—, jonika—, korinta—, komposita—...


**Orfe**o.—*Gr*. Orpheus (*Ĥor-feo*); *l*. Orpheus.



*h.*—Orfeo.
*p.*—Orpheo.
*i.* —Orfeo.
*f.* —Orphée.
*a.*—Orpheus.
*g.*—Orpheum.


*Greka, legenda filo de Apolo, kiu elpensis la liron k. per la muziko mildigis la bestojn; ikonografie estas reprezentita per junulo ludante liron k. ofte ĉirkaŭita de bestoj.*

**Orgen**o.—*Gr*. organon, *el* ergon (*verko*); *l*. organum.




Orgeno de la 16ª jc.


*h.*—órgano.
*p.*—orgao.
*i.* —organo.
*f.* —orgue.
*a.*—organg.
*g.*—Orgel.
*pol.*—organy.



Dorika ordo.



Jonika—.




Korinta—.



Kariatida—.

*Granda, tubara muzika blovinstrumento, uzata speciale en la temploj. Elpensita de Tesibio en Aleksandrio (2ª jc. a. K.); estas fama tiu de Amiens, havanta 2.000 tubojn.* —isto, —klavaro, —tubaro, —ludi.

**Orkestr**o.—*Gr.* orĥestra, *el* orĥeistai (*danci*); *l.* orchestra.




La orkestro en greka teatro.

*h.*—orquesta.
*p.*—orchestra.
*i.*—orchestra.
*f.*—orchestre.
*a.*—orchestra.
*g.*—Orchester.
*pol.*—orkiestra.

*Parto de la antikva greka teatro, inter la sceno k. la amfiteatro, kie la ĥoro kantis k. ludis ĉirkaŭ la arao de Dioniso. Parto de la moderna teatra ĉambrego, inter la aktorejo k. la publikejo, por la muzikistaro.*


**Orl**o. — *L.* orla, orula, *el* ora (*bordo*).



*h.*—orla.
*p.*—orlo.
*i.* —orlo.
*f.* —orle.
*a.*—orle.
*g.*—Saum.

*Ornamo farita ĉirkaŭ margeno de karto, ŝildo, tuko, k. c.* —i=*Ornami per orlo.*

**Ornam**i.—*L.* ornare, ad ornare (*ornami*).



1. Ornamo segilforma.
2. — fusoforma.
3. — diamantopinta.
4. — ŝakoforma.
5. — najlokapa.
6. — biljeto.
7. — zigzaga.
8. — freto.

*h.* — ornar, adornar.
*p.* — ornar, adornar.
*i.* —ornare, adornare.
*f.* — orner, ornamenter.
*a.* — adorn, ornament.
*g.* — schmucken, zieren (Ornament).

*Plibeligi ion per aldonaĵo.* —aĵo=*Ornamanta objekto.* —isto.

**Osir**(is)o.—*El egipta* Hesiris; *gr.* Osiris; *l.* Osiris.



Anub(is)o k. la mumio de sia patro Osir(is)o.

*h.*—Osiris.
*p.*—Osiris.
*i.* —Osiris.
*f.* —Osiris.
*a.*—Osiris.
*g.*—Osiris.

*Egipta dio, patro de Horuso, simbolis la sunon k. estis ikonografie reprezentita per homa figuro kun mitro surkapa k. lotuso ĉe la mano aŭ per viro bestokapa.*

# P

**Pagodo**.—*El persa* batkada, *el* bat *aŭ* pat + kada (*dia domo*).




Pagodo de Angkoro (Hind.).

*h.*—pagoda.
*p.*—pagoda.
*i.* —pagoda.
*f.* —pagode.
*a.*—pagoda.
*g.*—Pagode.
*pol.*—pagoda.

*Tipa templo de kelkaj aziaj popoloj.*

**Palaco**. — *El* Palateno, *propra nomo de unu el la 7 romaj montoj, kie Aŭgusto starigis sian loĝejon*; *l.* palatium.



Palaco de la sinjoreco. Venezio (Ital.).

*h.*—palacio.
*p.*—palacio.
*i.* —palazzo.
*f.* —palais.
*a.*—palace.
*g.*—Palast.
*pol.*—palac.
*r.*—palata.

*Granda, luksa edifico; loĝloko de altrangulo, de riĉulo.*

**Palafito**. — *El l.* palus + fictus (*marĉa domo*).



*h.*—palafito.
*p.*—palafitto.
*i.* —palafitta.
*f.* —palafite.
*a.*—palafitte.
*g.*—Pfahlbau.

*Surfosta domo super la akvo de lagoj, riveroj, k. c.; la prahomoj konstruis ĝin por sin defendi de la bestoj.*

**Palankeno**.—*El sansk.* parjanka (*lito*); *l.* palanga (*levilo*).



*h.*-palanquín.
*p.*-palanquim
*i.*-paranchino
*f.*-palanquin.
*a.*-palankeen.
*g.*-Palankin, Säufte.
*pol.*-palankin

*Portseĝo, litseĝo, uzata de aziaj popoloj speciale k. portata de servistoj.*

**Paleografi**o.—*El gr.* palaios + graphos (*antikva skribo*); *vorto elpensita en la* 17ª *jc.*



Paleografi-aĵoj.

*h.*—paleografía.
*p.*—paleographia.
*i.* —paleografia.
*f.* —paléographie.
*a.*—paleography.
*g.*—Paläographie.
*pol.*—paleografja.

*Arto deĉifri k. priskribi antikvajn skribaĵojn k. signojn. Fakoj* : Epigrafio (*rilate skribaĵoj sur ŝtono*); Bibliologio (*pri libroj*); Diplomatio (*pri dokumentoj*).

Paleografo = *Specialisto pri paleografio.*

**Paleolit**o.—*El gr.* palaios + lithos (*antikva ŝtono*).




Arkeolitoj de la epoko paleolita.

*h.*—paleolítico.
*p.*—paleolitico.
*i.* —paleolitico.
*f.*—paléolithique.
*a.*—paleolithic.
*g.*—paläolithisch.

*Epoko de la prahomo; oni sciis prilabori sed ne ankoraŭ poluri la ŝtonilojn; tiam aperis la unuaj signoj de arto sur ŝtonoj, kornoj, osto, eburo, k. tipaj bildoj en grotoj, kiel tiuj de Altamiro (Hisp.). Subepokoj* : strepa (*el Strepo*), ĉelesa (*el Cheleso*), aĉenla (*el Acheles*), mustiera (*el Moustiero*), aŭrinaka (*el Aurignac*), solutra (*el Solutréo*), magdalena (*el Madeleine*), acila (*el Mas d'Acila*).

**Palestr**o.—*Gr.* palaistra, *el* palaio (*lukti*); *l.* palaestra.




Palestro ĉe romanaj termoj.

*h.*—palestra.
*p.*—paléstra.
*i.* —palestra.
*f.* —palestre.
*a.*—palastra.
*g.*—Palästra.

*Korpekzercejo, luktejo, diskutejo.*

**Paletr**o. — *Diminutiva formo de la l.* pala (*ŝpato*).



Paletro kun penikoj.

*h.*—paleta.
*p.*—palheta.
*i.* —paletta.
*f.* —palette.
*a.*—palette.
*g.*—Palette.
*pol.*—paletra.
*r.*—paletra.
*sv.*—palett.

*Maldika tabuleto uzata de pentristoj por pretigi k. miksi kolorilojn.*

**Paliso**. — *L.* palicium, *el* palus (*stango*).



Palis-aro.

*h.*—palo, estaca, (empalizada).
*p.*—estaca.
*i.* —palo, (palizzata).
*f.* — pieu, (palissade).
*a.* — pale, stake, (palisade).
*g.*—Pfahl, (palisade).
*pol.*—pal.

*Forta, malsupre pinta stangeto por fiksi ĝin en tero.* —aro= *Vico de palisoj starigitaj por bari, limigi, protekti, k. c.* —i= *Starigi palisaron.* —eto.

**Panelo**. — *El gr.* penos (*tuko*); *l.* pannus.




*h.*—panel.
*p.*—panello, painel.
*i.* —pannello.
*f.* —panneau.
*a.*—panel.
*g.*—Panneau.
*pol.*—panneau.

*Enkadrigita tabulo aŭ similaspekta spaco ĉe muro, plafono, pordo, k. c., foje ornamita per pentroj aŭ reliefoj.*

**Panoramo**.—*El gr.* pan + horama (*ĉia vido*). *Vorto elpensita de R. Barker en* 1787ª *j.*

*h.*—panorama.
*p.*—panorama.
*i.* —panorama.
*f.* —panorama.
*a.*—panorama.
*g.*—Panorama.
*pol.*—panorama.



*Granda pentraĵo sur ronda, konkava muro lumigita de supre k. rigardebla de la malluma centro. Ejo, kie oni elmetas tian bildon. Kiam oni elmetas plurajn bildojn oni nomas ĝin* Polioramo.


**Panteono**. — *El gr.* pan + theos (*ĉia dio*); *l.* pantheon.

*h.*—panteón.
*p.*—pantheon.
*i.* —panteone.
*f.* —panthéon.
*a.*—pantheon.
*g.*—Pantheon.

*Templo por ĉiuj dioj, por ĉiaj gloriuloj.*

**Pantografo.**—*El gr.* pan + graphos (*ĉio desegni*). *Vorto elpensita de Maiolaiso en* 1615ᵃ *j.*

*h.*-pantógrafo.
*p.*-pantographo
*i.*-pantografo.
*f.*-pantographe.
*a.*-pantograf.
*g.*-Pantograph.




*Instrumento por kopii, laŭ vola proporcio, planon, desegnaĵon.* —io = *Arto kopii desegnojn per pantografo.*

**Papir**(us)o.—*Gr.* papiros; *l.* papyrus antiquorum.


*h.*—papiro.
*p.*—papyro.
*i.* —papiro.
*f.* —papyrus.
*a.*—papyrus.
*g.*—Papyrus.
*pol.*—papirus.

*Egipta cipero, kies fibrotekŝaĵon la antikuloj uzis por skribi k. desegni. Paleografia dokumento skribita sur folio de tia tekŝaĵo.*

**Parapeto.**—*El l.* parare + pectus (*ŝirmi bruston*).





2)



*h.*--parapeto, antepecho, baranda, pretil.
*p.*-parapeito, anteparo, peitoril.
*i.* —parapetto, sponda.
*f.*—parapet, garde-fou.
*a.*—parapet.
*g.*—Brustwehr, Geländer.

*Randmuro, barantilo, brustoŝirmilo ĉirkaŭ unu metro alta, ĉe fortikaĵo, teraso, fenestro, ponto, k. c.* —i = *Konstrui parapeton.*


**Parcelo.** — *L.* parcella, *el* pars (*parto*).



*h.*—parcela.
*p.*—parcélla.
*i.* —particella.
*f.* —parcelle.
*a.*—parcel.
*g.*—Parzelle.

*Ĉiu parto rezultanta el dividi diverscele grandan terenon.* —i = *Pecigi grandan areaĵon, por formi konstrugrundojn, kulturpropraĵojn, malgrandajn fundojn, pli facile negoceblajn.*

**Parget**o.—*El l.* spargo, spargito (*dividita, dismetita*).

1)

2)

*h.*—parquet.
*p.*—parquet.
*i.* —parquet.
*f.* —parquet.
*a.*—parget.
*g.*—Parkett.
*pol.*—parkiet.
*r.*—parket.

*Luksa ligna pavimo, konsistanta el arte kunmetitaj tabuletoj.* —i=*Pavimi per pargeto.* —ero=*Ĉiu el la tabuletoj de tia pavimo.*

**Pari**o.—*El sansk.* par (*protekti*); *l.* paries, parietis.


Pario de tabuloj.

*h.*—pared.
*p.*—parede.
*i.* —parete.
*f.* —paroi.
*a.*—wall, (*parietal*).
*g.*—Wand.

*Limigaĵo de spaco.* Tubo—, tendo—, vazo—, ĉambro—.

**Park**o.—*L.* parcus (*parko*).

*h.*—parque.
*p.*—parque.
*i.* —parco.
*f.* —parc.
*a.*—park.
*g.*—Park.
*pol.*—park.
*r.*—park.

*Arta, ofte ĉirkaŭbarita, ĝardenarbaro.*


**Partenon**o. — *El gr.* Parthenos (*virgino*), *alnomo de la Atena diino.*



*h.*—Partenón.
*p.*—Parthenon.
*i.* —Partenone.
*f.* —Parthénon.
*a.*—Parthenon.
*g.*—Parthénon.

*Dorika, plej fama templo de la atena akropolo, projektita de la arkitekto Iktino (450 j. a. K.).*

**Parter**o.—*El l.* per + terra (*sur tero*).



*h.*—parterre, patio.
*p.*—platéea.
*i.* —partere, platea.
*f.* —parterre.
*a.*—parterre, pit.
*g.*—Parterre.
*pol.*—parter.
*r.*—parter.

↑ *Teretaĝo de teatra salonego.*

**Paŝtel**o. — *El gr.* paste (*paŝto*); *l.* pasta, pastillus.

*h.*—pastel.
*p.*—pastél.
*i.* —pastello.
*f.* —pastel.
*a.*—pastel.
*g.*—Pastell.
*pol.*—pastel.

*Pentro farita per pulvorigitaj krajonoj.* —krajono=*Tipa speciala kolorilo por pentri paŝtele.*

**Pavilono**.—*El l.* papilio, papilionis (*pavilono, tendo*).



Pavilono ĉe ĝardena palaco.

*h.*—pabellón.
*p.*—pavilhao.
*i.* —padiglione.
*f.* —pavillon.
*a.*—pavilion.
*g.*—Pavillon.


*Konstruaĵo kunligita aŭ sindependa de alia centra, ĉefa, pli granda. Granda, luksa tendo.*

**Pavimo**.—*L.* pavimentum (*pavimo*).




Pavimo de ĉambro.

*h.*—pavimento, solado.
*p.*—pavimento, calcamento, lageado.
*i.* —pavimento, selciato.
*f.* —pavement, pavage, pavé.
*a.*—pavement, paving.
*g.*—Pflaster.



Pavimo de ŝoseo.

*Ŝtona, ligna, asfalta kovraĵo de strato, planko, ŝoseo.* —i=*Kovri per pavimo.* —isto.

**Pegaso**.—*El gr.* pege (*fonto*), *ĉar ĉi tiu estaĵo naskiĝis el la ŝpruĉanta sango de la Meduzo, kiam Perseo detranĉis ĝian kapon.* L. Pegasus.



*h.*—Pegaso.
*p.*—Pegaso.
*i.* —Pegaso.
*f.* —Pégase.
*a.*—Pegasus.
*g.*—Pegasus.

*Mita, flugilhava ĉevalo rajdita de Belerofonto por mortigi la Ĥimeron; poste, por rajdi ĉielen; sed Jupitro punis ĉi tiun decidon k. faligis la rajdiston k. steligis Pegason. (Tial, la konstelacio tiel nomata).*


**Pejzaĝo**.—*El l.* pagensis, *el* pagus (*loko, vilaĝo*).



*h.*—paisaje.
*p.*—paizágem.
*i.*—paesaggio.
*f.*—paysage.
*a.*—landscape.
*g.*—Landschaft.
*pol.*—pejzaz.

*Vido de lando; bildo arte prezentanta tian vidaĵon.*

**Pendentivo.**—*L.* pendens, pendentis, *el* pendere (*pendi*).




2) Kupolo sur pendentivoj.

*h.*—pechina.
*p.*—pendentif.
*i.* —pennacchio, pennone, peducci.
*f.* —pendentif.
*a.*—pendentive.
*g.*—Pendentife, Eckzwickel.

*Kurblinia triangulaĵo de ĉiu pilastro al kupolo.*

**Peniko.**—*L.* penicillus, *el* penis (*vosto*).



*h.*—pincel.
*p.*—pincel.
*i.* —pennello.
*f.* —pinceau.
*a.*—pencil.
*g.*—Pinsel.
*pol.*—pedzel.
*sv.*—pensel.

*Ilo konsistanta el aro da haroj kunligitaj ĉe la ekstremo de bastoneto, uzata de pentristoj por ŝmiri farbojn.*

**Pensiono.**—*L.* pensio, pensionis (*pensio*), *el* pensum (*tasko*).

*h.*—pensión.
*p.*—pensao.
*i.* —pensione.
*f.* —pension.
*a.*—pension, boarding-house.
*g.*—Pensionat.
*pol.*—pensjonat.

*Domo, apartamento, kie oni povas daŭre loĝi k. manĝi, pagante interkonsentitan sumon.*

**Pentastilo.**—*El gr.* pente + stilos (5—*kolono*); *l.* pentastylus.

*h.*—pentástilo.
*p.*—pentastylo.
*i.* —pentastilo.
*f.* —pentastyle.
*a.*—pentastylos.
*g.*—Pentastilon.

*Konstruaĵo havanta kvinkolonan vicon antaŭfasade.*

**Pentri.**—*L.* pingere, pictum (*pentri*).



*h.*—pintar.
*p.*—pintar.
*i.*—di-pingere.
*f.*—peindre.
*a.*—paint.
*g.*—malen.

*Reprodukti kolore objekton, pejzaĝon, estaĵon, sur papero, tuko, ligno, metalo, stuko, k. c. Kolorigi.* Oleo—,


akvarelo—, tuĉo—, fresko—, detrempo—, enkaŭsto—, guaŝo—, paŝtelo—... —ado=—arto, —isto, —ilo.

**Pergameno**.—*El* Pergamos, *propra greka nomo de nuna urbo Bergamo en Malgranda Azio;* *l.* pergamena.

*h.*—pergamino.
*p.*—pergaminho.
*i.* —pergamena.
*f.* —parchemin.
*a.*—parchement, pergameneous.
*g.*—Pergament.
*pol.*—pergamin.

*Ŝafofelo preparita por pentri aŭ skribi sur ĝi, multe uzata de la 4ª ĝis la 10ª jc., skribita per ruĝa, blua, aŭ violkolora inko. La biblioteko de Atalo en Pergamo* (197 *j. a. K.*), *havis* 200.000 *pergamenojn.*


**Pergolo**. — *L.* pergula (*galerio, ekstera trabaĵo*), *el* pertica (*stango*).



*h.*—pérgola.
*p.*—pergola.
*i.* —pergola.
*f.* —pergola.
*a.*—pergola.
*g.*—Pergolo.

*Fostaro aŭ kolonaro subtenanta tratrabojn, uzita en la bazilikoj, antaŭ la presbiteriejo, kiel ikonostaso; uzata en ĝardenoj por subteni vegetaĵojn k. florojn, kiel verando aŭ ombrejo.*


**Peribolo**.—*Gr.* peribolo, *el* peri + ballein (*ĉirkaŭo ĵeti*) ; *l.* peribolus.



*h.*—peribolo.
*p.*—peribolo.
*i.* —peribolo.
*f.* —péribole.
*a.*—peribole.
*g.*—Peribolo.

*Sanktigita tereno ĉirkaŭ templo. Unue templo estis nur arao k. ĉirkaŭ ĝi iu spaco estis rezervita, limigita, per kromlecho, palisaro aŭ muro; poste la altaro stariĝis en templo ĉirkaŭita ankaŭ de tereno, kun boskoj, fontanoj, statuoj, k. a.*


**Periptero**. — *Gr.* peripteros, *el* peri + pteron (*ĉirkaŭ alo*) ; *l.* peripteros.



*h.*—periptero.
*p.*—periptero.
*i.* —periptero.
*f.* —periptére.
*a.*—peripteros.
*g.*—Peripteros.


*Konstruaĵo ĉirkaŭita per kolonaro.* Pseŭdo—=*Konstruaĵo ĉirkaŭita per kolonoj duoninkrustitaj en la muroj.*

**Peristil**o.—*Gr.* peristilos, *el* peri + stilos (*ĉirkaŭ kolono*); *l.* peristilos.



Peristilo de romana atrio.

*h.*—peristilo.
*p.*—peristilo.
*i.* —peristilo.
*f.* —péristyle.
*a.*—peristyle.
*g.*—Peristyl.
*pol.*—perystyl.




Plano de greka templo kun interna k. ekstera peristilo.

*Kolonaro, kiu ĉirkaŭas, interne aŭ ekstere, iajn konstruaĵojn.*

**Peron**o. — *El f.* parron, *el* pas rond (*pasejo ronda*).




*h.*—grada, gradilla.
*p.*—escada.
*i.* —gradini, banchina.
*f.* —perron.
*a.*—perron.
*g.*—Perron, Freitreppe.
*pol.*—peron.

*Ŝtupo aŭ ŝtuparo antaŭ konstruaĵo, kies teretaĝo estas iom pli altenivela ol la strato. Alta trotuaro konstruita en stacio laŭlonge de la fervojo por ebligi al la pasaĝeroj facile en k. el vagoniĝi.*


**Pers**a (*arto*).—*Gr.* Persai ; *l.* Persia, *propra nomo de lando azia.*



*h.*—persa.
*p.*—pérsa.
*i.* —persiano.
*f.* —perse.
*a.*—persian.
*g.*—persisch.

*Arto de Persio; ĝi entenas, krom la moderna, tri historiajn periodojn: la unua, persa, de 6ª jc. a. K., konservas famajn ruinojn kun grandajn terasojn en Persepolo, Suso k. Pasagardo; la dua, arsacida-sasanida, de 3ª jc. a. K., konservas ruinojn de palacoj kun kupolo en Firuzabado k. Sarvisteno; la tria, mahometana, 7-13ª jc., montras la moskeojn de Isfaheno k. Kasveno kun iliaj tipaj, kilformaj arkaĵoj k. piroformaj volboj.*


**Persien**o. — *El* Persio, *propra nomo de lando azia.*



*h.*—persiana.
*p.*—persiana.
*i.* —persiana.
*f.* —persienne.
*a.*—persienne.
*g.*—Persienne.

*Ligna aŭ metala, aĵura pordo aŭ fenestro-kovrilo.*

**Perspektivo**. — *L*. perspectiva, *el* perspicere, perspectum (*travidi, devidi*).




Perspektivo aksonometria.

*h*.—perspectiva.
*p*.—perspectiva.
*i*. —perspectivo.
*f*. —perspective.
*a*.—perspective.
*g*.—Perspektive.
*pol*.—perspektywa.

*Arto reprezenti grafike pejzaĝon, objekton, figuron, k. c.* Linia—, aera—, aksonometria—, isometria—, paralela—, panorama—.

**Piedestalo**.—*El gr*. podos + stall (*piedo + staraĵo*).



*h*.—pedestal.
*p*.—pedestal.
*i*. —piedestallo.
*f*. —pidestal.
*a*.—pedestal.
*g*.—Piedestal.
*pol*.—piedestal.

*Subportilo, ofte modlurita ĉe ĝia bazo k. kornico.*


**Piknostilo**.—*Gr*. piknostilos, *el* piknos + stilos (*densa kolono*); *l*. pycnostylos.



Piknostila konstruaĵo.


*h*.—picnostilo.
*p*.—picnostylo.
*i*.—picnostilo.
*f*.—pycnostyle.
*a*.—pycnostyle.
*g*.—Pyknostyl.

Klasifiko de la kolonaroj laŭ ilia interkolona distanco.




*Kolonaro, kies kolonaj interspacoj mezuras 3 modulojn.*

**Pilastro**. — *L*. pilarius, pilatim, *el* pila (*subtenilo*).







5.-Ordo kun pilastroj.

*h*.—pilastra, pilar.
*p*.—pilastra, pilar.
*i*. —pilastro, pila.
*f*. —pilastre, pilier.
*a*.—pilaster, pier, pile.
*g*.—Pilaster, Pfeiler.
*pol*.—pilaster.


*Prisma subtenilo.* —aro, duon—, ponto—, faska—.

**Pilono.** — *Gr.* pilon (*pordo*); *l.* pila.



1. Obeliskoj antaŭ pilono.

*h.*—pilón.
*p.*—pilon.
*i.* —pilon.
*f.* —pylône.
*a.*—pylon.
*g.*—Pylon, Pilonen.



2. Dromo, antaŭ propilono.

*Monumenta enirejo ĉe egiptaj konstruaĵoj defendornamita ambaŭflanke per turoj.* Pro-pilono=*Pli simpla enirejo, konsistanta el tursimila portalo.*

**Pinaklo.**—*L.* pinnaculum, *el* pinna (*krenelo, pinto*).



Pinaklo gotika.

*h.*—pináculo.
*p.*—pinaculo.
*i.* —pinacolo.
*f.* —pinacle.
*a.*—pinnacle.
*g.*—Pinaculum, Viale.

*Pinta, arkitektura, ornama kronaĵo.*


**Pinakoteko.** — *Gr.* pinakoteka, *el* pina + theke (*bildo konservejo*); *l.* pinacotheca.



*h.*—pinacoteca.
*p.*—pinacoteco.
*i.*—pinacoteca.
*f.*--pinacothéque
*a.*—pinakotheke
*g.*—Pinakothek.

*Muzeo de pentraĵoj.*

**Pioĉo.**—*El kelta* pik (*pikilo, pinto*); *l.* picus, picutius, picocia.



*h.*—piocha, espiocha.
*p.*—alviao.
*i.* —pioggia.
*f.* —pioche.
*a.*—pick-axe, mattock.
*g.*—Pickel, Karst.

*Ilo, uzata por fosi k. dekonstrui, konsistanta el fero stango—kies ekstremoj estas pinta, unu el ili, platotranĉa la alia—perpendikle fiksa je ligna tenilo.* —i=*Labori per pioĉo.*

**Piramido.** — *El egipta* piremus (*altaĵo*); *gr.* piramis; *l.* pyramis, pyramidis.




Piramido egipta kun la sfinkso.

*h.*—pirámide.
*p.*—pirámide.
*i.* —piramide.
*f.* —pyramide.
*a.*—pyramid.
*g.*—Pyramide.
*pol.*—piramide.

*Monumento kun kvar triangulaj flankoj k. kvadrata bazo, servanta kiel tombo por egiptaj faraonoj. Solido, kies bazo estas poligono k. kies lateroj estas trianguloj kuniĝantaj en pinton.*


**Piscino**. — *L.* piscina, *el* piscis (*fiŝo*).



*h.*—piscina.
*p.*—piscina.
*i.* —piscina.
*f.* —piscine.
*a.*—piscina.
*g.*—Weiher, Fischteich.

*Vazego, baseno, akvujo por bredi fiŝojn, por naĝi.*

**Pivoto**.—*El i.* piva, *l.* pipa (*pipo*).




1. Pivoto. 2. Pivotingo.

*h.* — pivote, quicio, gorrón.
*p.* — quicio, gonzo, eixo.
*i.* —perno, piva.
*f.* —pivot.
*a.* — pivot, gudgeon.
*g.* — Pivot, Zapfen.

*Apogekstremo de rotacia akso eniĝanta en truo* (pivotingo).

**Placo**.—*El gr.* plateia (*platajo*); *l.* platea.



Placo de Sankta Marko, en Venezio (Ital.).

*h.*—plaza.
*p.*—praça.
*i.* —piazza.
*f.* —place.
*a.*—place, square.
*g.*—Platz.
*pol.*—plac.

*Libera spaco, ĉirkaŭata de domoj en urbo aŭ vilaĝo.* —eto.

**Plafono**. — *El l.* planus fundus (*plata fono*).





*h.*—techo, plafón.
*p.*—tecto.
*i.* —soffitto.
*f.* —plafond.
*a.*—plafond, ceiling.
*g.*—Zimmerdecke, Plafond.

*Horizontala aŭ kurba surfaco formanta la supran internan parion de ĉambro, galerio, k. c.*

Plata—, trogoforma—, panelita—, pentrita—, ligna—...

**Plan**o.—*L*. planus (*plano, ebeno*).
*h*.—plano.
*p*.—plano.
*i*. —plano.
*f*. —plan.
*a*.—plan.
*g*.—Plan, Grundriss.
*pol*.—plan.



Planoj de templeto : Ekstero, Sekcio k. Planko.

*Desegno, laŭ skalo, de loko aŭ konstruo*. Situo—, topografia—, fundamenta—, tegmenta—, etaĝa—, sekcia—, fasada—, urbo—, kvotita—.
—i = *Planoverki*.

**Planimetri**o.—*El l*. planus + *el gr*. metron (*plato mezuro*).



Planimetrio de urbo-kvartalo.

*h*.—planimetría.
*p*.—planimetria.
*i*. —planimetria.
*f*. —planimetrie.
*a*.—planimetry.
*g*.—Planimetrie.
*r*.—planimetria.

*Parto de la topografio, kiu pritraktas la reprezentadon de planoj k. landokartoj, sen nivellinioj. Tia reprezentado*. Planimetro = *Aparato por mezuri la areon de plano*.

**Plank**o. — *L*. planca, *el* planus (*plataĵo*).





*h*.—piso, planta.
*p*.—plânta, assoalho.
*i*. —pianta, impiantito.
*f*. —plan, plancher.
*a*.—floor, plan.
*g*.—Fussboden, Planke.

*Plataĵo, kiu apartigas unu etaĝo de la alia*.

**Plast**i.—*El gr*. plaste (*formigaĵo*); *l*. emplastrum.

*h*.—plastecer, revocar, enfoscar, enlucir.
*p*.—plasmar, engessar.
*i*. —plasticare, intonacare.
*f*. —plâtrer, enduire.
*a*.—plaster.
*g*.—be)pflastern, putzen.



*Kovri, ŝmiri malglatan supraĵon per mortero aŭ alia glueca, pasta subtanco*. Dik— = *Plasti per dika ŝmiraĵo, laŭ dika tavolo*.

**Plastik**o.—*Gr.* plastikos, *el* plassein (*formi*); *l.* plasticus.




Plastika arto, (skulptado).

*h.*—plástica.
*p.*—plástica.
*i.*—plastica.
*f.*—plastique.
*a.*—plastic.
*g.*—Plastik.
*pol.*—plastyka.

*Arto produkti aŭ reprodukti figurojn per reliefo, koloro, formo.* Galvano—= *Procedo surkovri aŭ reprodukti metale, per elektra fluo, statuon, reliefon, gravuron.*

**Plateresk**a (*arto*).—*El l.* plata (*metala lameno*); *vorto elpensita de Ponzo,* 17ª *jc.*



Plateresko portalo.

*h.*—plateresco.
*p.*—plateresco.
*i.*—plateresco.
*f.*—plateresque.
*a.*—plateresque.
*g.*—Plateresco.

*Tipa gotiko-renesanca arto, uzata unue de la hispanaj juvelistoj—arĝentistoj, k. poste de la arkitektoj, dum la* 16ª *jc.*

**Plint**o.—*El gr.* plinthos (*briko*); *l.* plinthus.




*h.*—plinto.
*p.*—plintho.
*i.*—plinto.
*f.*—plinthe.
*a.*—plinth.
*g.*—Plinthe.

*Plataĵo servanta kiel bazo de kolono, pilastro, piedestalo, soklo, bazamento.*

**Plumb**o.—*L.* plumbum (*plumbo*).

Pb

Simbolo ĥemia.

*h.*—plomo.
*p.*—chúmbo.
*i.*—piombo.
*f.*—plomb.
*a.*—lead, plumb.
*g.*—Blei, (Plombe).

*Ĥemia elemento, blugriza, peza, fleksebla metalo, uzata en konstruado.*
—isto = *Laboristo je plumbaĵoj.*
—umi = *Plenigi juntojn per plumbo.*

**Plut**o. — *Gr.* Hades, Pluton, *el* plusios (*riĉo*); *l.* Plutus.



*h.*—Pluto.
*p.*—Pluto.
*i.*—Pluto.
*f.*—Ploutos.
*a.*—Plutus.
*g.*—Pluto.

*Mita dio de la riĉaĵo, filo de Cerera k. Jaso; reprezentita ikonografie per blindulo disdonante monerojn k. valoraĵon.*

**Plutono.**—*L.* Pluto, *el* plusios (*riĉo*), *ĉar interne de la tero kuŝas la riĉaĵoj.*



*h.*—Plutono.

*p.*—Plutao.

*i.* —Plutono.

*f.* —Pluton.

*a.*—Pluto.

*g.*—Pluton.

Plutono k. la Cerbero.

*Mita dio de la infero, filo de Ĥrono k. Cibelea, edzo de Proserpino, reprezentita ikonografie per barbulo kun sceptro k. la cerbero ĉe la piedoj.*

**Podio.**—*Gr.* podion (*piedo, apogaĵo*); *l.* podium.




*h.*—podio, poyo.

*p.*—podio, poial.

*i.* —podium.

*f.* —podium.


*a.*—podium.

*g.*—Podium.

*pol.*—podjum.

*Diverscela, benkosimila apogaĵo. Ĉe la antikvaj anfiteatroj, la muro, kiu ĉirkaŭas la arenon.*

**Poliptiko.** — *Gr.* poliptikos, *el* polis + ptikos (*plura faldo*); *l.* polyptichus.



*h.*—poliptico.

*p.*—polipticho.

*i.* —poliptico.

*f.* —polyptyque.

*a.*—polyptych.

*g.*—Polyptychon.


*Retablo, bildo havanta plurajn panelojn. Kiam la paneloj estas 2, 3, 5... nomiĝas* diptiko, triptiko, pentaptiko...

**Polikromio.**—*El gr.* poli + ĥromos (*plura koloro*).

*h.*—policromía.
*p.*—polycromia.
*i.* —policromia.
*f.* —polychromie.
*a.*—polychromy.
*g.*—Polychrom.

*Procedo presi, ornami, kolorigi ion per pluraj koloroj. Kiam la koloro estas nur unu, nomiĝas* monokromio; *kiam tri,* trikromio.

**Poluri.**—*L.* polire (*poluri, briligi*).




Poluristoj egiptaj poluras unupecan kolonon. (Desegno egipta).

*h.*—pulir, pulimentar.
*p.*—polimentar.
*i.* —pulire, lucidare.
*f.* —polir.
*a.*—polish.
*g.*—polieren.
*pol.*—polysk, polor.

*Fari ion glatan ḱ. brilantan per frotado.* Man—, —isto. —ilo.

**Pompej**a (*arto*). — *El* Pompeia, *propra itala nomo de urbo* ; *l.* pompeianus.



*h.*—pompeyano.
*p.*—pompeiano.
*i.* —pompeiano.
*f.* —pompéien.
*a.*—pompeian.
*g.*—pompejanisch.

Pompeja pentraĵo.

*Tipa arto, influita de la greḱa, disvolviĝinta en la itala urbo Pompeja, tiu, ḱiun ḱovris per lafo la Vesubio.*

**Pont**o. — *Sansḱ.* panthas, patha (*vojo*) ; *l.* pons, pontis.



*h.*—puente.
*p.*—pônte.
*i.* —ponte.
*f.* —pont.
*a.*—bridge, (Pontoon).
*g.*—Brücke, (Ponton).

Ponto de la turo de Londono.

*Superaḱva aŭ supervoja trairejo farita el ŝtono, metalo, ligno, ḱ. c.* Unuarka—, plurarka—, pendanta—, turnebla—, levebla—, armitbetona—.

**Pontono**.—*El gr.* pontos (*maro, aḱvaĵo*); *l.* ponto, pontonis (*riverobarḱo*).

*h.*—pontón.
*p.*—pontao.
*i.* —pontone.
*f.* —ponton.
*a.*—pontoon.
*g.*—Ponton.
*pol.*—ponton.

*Flosponto. Ŝipo por flosponto. Simpla ligna ponto.*

**Porcelan**o.—*El la i. nomo de perlamota ḱonḱo* porcella (*porḱeto*), *ĉar tiu ḱonḱo similas tiel.*



*h.*—porcelana.
*p.*—porcelana.
*i.* —porcellana.
*f.* —porcelaine.
*a.*—porcelain.
*g.*—Porzellan.
*pol.*—porcelana.
*sv.*—porslin.

Porcelan-aĵo de Kopenhago.

*Blanḱa substanco el baḱita, deliḱata argilo, diafana ḱ. sonora ḱiel vitro, ofte uzata por fari belajn objeḱton.*

**Pord**o.—*El sansḱ.* par (*iri*) ; *gr.* poros (*pasaĵo*) ; *l.* porta.




*h.*—puerta.
*p.*—porta.
*i.* —porta.
*f.* —porte.
*a.*—door, gate, (portal).
*g.*—Tür, (Portal).
*sv.*—dörr.

Pordo megalita.

*Enirejo; movebla fermilo de enirejo.* —eto, —ego, —hoko, —istejo, —frap-

ilo, —kadro, —panelo, —kurteno. Ligna —, tabulata —, dufolia —, glit—, krado—... Sur—, urbo—, remizo—, kastelo—...

**Portal**o.—*El l.* porta (*pordo*).



Portalo de monaĥejo. Teruelo (Hisp.).

*h.*—portada.

*p.*—portáda.

*i.* —portale.

*f.* —portail.


*a.*—portal.

*g.*—Portal.

*pol.*—portal.

*Enirejo monumenta. Fasado kies ĉefaĵo estas la pordo k. ĝiaj ĉirkaŭornamoj.*

**Portik**o.—*L.* porticus (*pordaĵo*), *el* porta.



Portiko de la gloro, ĉe la katedralo de Santiago (Hisp.).

*h.*—pórtico, porche.

*p.*—portico.

*i.* —portico.

*f.* —portique, porche.

*a.*—porticus.

*g.*—Portikus.

*pol.*—portyk.

*Publika spaco tegmentita, antaŭ konstruaĵo.*

**Portland**o.—*El* Portland, *propra nomo de angla insulo.*

*h.*—portland.

*p.*—portland.

*i.* —portland.

*f.* —portland.

*a.*—portland.

*g.*—Portland.

*Polvo produktita per kuiro de argilo k. stingita kalko, uzata por konstruaĵoj.*

**Portret**o.—*El l.* pro tractus (*antaŭen tirata*).



Aŭto-portreto de Goya.

*h.*—retrato.

*p.*—retrato.

*i.* —ritratto.

*f.* —portrait.

*a.*—portrait.

*g.*—Porträt.

*pol.*—portret.

*sv.*—porträtt.

*Bildo prezentanta iun personon.* Perkrajona—, fotografa—, oleopentrita—... —i=*Fari portreton.*

**Poz**i.—*El l.* pausare (*ripozi, halti*).



*h.*—posar.

*p.*—pousar.

*i.* —posare.

*f.* —poser.

*a.*—to pose.

*g.*—posieren.

*Akcepti k. konservi specialan tenîgon por esti desegnata, pentrata, skulptata, fotografata, k. c.* —isto=*Homo, kiu profesie pozas antaŭ artisto.*

**Predel**o.—*El i.* predella.




*h.*—predela.
*p.*—predela.
*i.* —predella.
*f.* —prédelle.
*a.*—predella.
*g.*—Predella.

*Benketo, laŭlonge de la kristana altara tablo, foje servanta kiel soklo de retablo k. havanta en la centra parto tabernaklon k. krucon.*

**Priap**o.—*Gr.* Priapos ; *l.* Priapus.




Ofero antaŭ Priapo.

*h.*—Priapo.
*p.*—Priapo.
*i.* —Priapo.
*f.* —Priape.
*a.*—Priapus.
*g.*—Priapus.
*pol.*—Priapus.


*Mita diaĵo, filo de Dioniso k. Afrodita, protektanto de ĝardenoj k. paŝtistoj; ikonografie reprezentata per hermesa figuro kun penisa emblemo.*

**Profil**o. — *El l.* per filum (*laŭ linio*).




1. Profilo laŭlonga.
2. — laŭlarĝa.


*h.*—perfil.
*p.*—perfil.
*i.* —profilo.
*f.* —profil.
*a.*—profile.
*g.*—Profil.
*pol.*—profil.



Profilo de avenuo en Parizo.

*Konturo de figuro, de konstruelemento, de tereno, de projekcio.* —ilo= *Ilo por fari la profilon de modluro, k. c.* Kontraŭ— =*Profilo de io komplementa de aliaĵo profilita.*

**Projekci**o. — *L.* proiectio, *el* proiectare (*ekĵeti*).




Projekcio (P) de kubo (K) sur ebeno (E).

*h.*—proyección.
*p.*—projeccao.
*i.* —proiezione.
*f.* —projection.
*a.*—projection.
*g.*—Projektion.
*pol.*—projekcja.

Kinematografa projekcio.




*Reprezento de punkto, linioj, objekto, sur ebeno laŭ difinitaj reguloj. Luma bildo sendita sur ekranon per speciala lanterno.* —i=*Fari projekcion.* Aksonometra—, isometra--, paralela—, horizontala—, vertikala—, merkatora—, cilindra—, lumbilda—, kinematografa—.

**Projekt**o.—*L.* projectus, *el* projectare (*ekĵeti*).




*h.*—proyecto.
*p.*—projecto.
*i.*—progetto.
*f.*—project.
*a.*—project.
*g.*—Projekt, Entwurf.
*pol.*—projekt.
*r.*—proekto.



*Detala dokumentaro priskribinta konstruotaĵon.* —i = *Fari projekton.* —isto, antaŭ—.

**Promete**o.—*El sansk.* pramanthius (*fajristo*); *gr.* Prometheus ; *l.* Prometheus.



*h.*—Prometeo.
*p.*—Promethéo.
*i.*—Prometeo.
*f.*—Prométhée.
*a.*—Prometheus.
*g.*—Prometheus

*Mita giganto, filo de Japeto, kiu rabis la fajron el la ĉielo por la homo, pro kio li estis punĉenata de la dioj ĉe la pinto de kaŭkasa monto, kie la rabobirdoj mordetis lin la intestojn.*


**Pronaos**o.—*Gr.* pronaos, *el* pro + naos (*antaŭa navo*) ; *l.* pronaos.





*h.*—pronaos.
*p.*—pronaos.
*i.*—pronaos.
*f.*—pronaos.
*a.*—pronaos.
*g.*—Pronaos.
*pol.*—pronaos.

*Antaŭnavo, vestiblo, de la grekaj k. aliaj antikvaj temploj.*

**Propile**o. — *El gr.* pro pilaion (*antaŭ pordo*) ; *l.* propyleus.






Propileo
de la atena akropolo.

*h.*—propileo.
*p.*—propyleo.
*i.*—propileo.
*f.*—propylée.
*a.*—propylon, propilaia.
*g.*—Propiläen.

*Monumenta enirejo antaŭ grandaj edificoj. Antonomasie, tiu cela konstruaĵo en la atena akropolo.*


**Prosceno.** — *Gr.* proskenion, *el* pro + skene (*antaŭ sceno*); *l.* proscenium.



*h.*—proscenio.
*p.*—proscenio.
*i.* —proscenio.
*f.* —proscènium.
*a.*—proscenium.
*g.*—Proszenium.

*Parto de la teatro inter la scena kurteno aŭ kolonaro k. la orkestro. Antaŭscenejo.*


**Prostilo.**—*Gr.* prostilos, *el* pro + stilos (*antaŭ kolono*); *l.* prostylos.




*h.*—prostilo.
*p.*—próstylo.
*i.* —prostilo.
*f.*—prostyle.
*a.*--prostylos.
*g.*-Prostylos.

*Portiko formita per kolonoj; konstruaĵo kun tia portiko.* Amfi— = *Konstruaĵo havanta antaŭan k. malantaŭan kolonaron.*


**Pulio.** — *El gr.* polos (*akso*); *l.* trochlea.



*h.*—polea.
*p.*—poléa, pulea.
*i.* —puleggia, girella.
*f.* —poulie.
*a.*—pulley.
*g.*—Scheibe.

*Rado, perimetre kanelita, rulebla sur ĝia akso.* —aro = *Sisteme akordigita aro da pulioj.*

**Pumpi.**—*El gr.* bombos (*bruo*); *l.* bombus (*antlia extrahere*).




Pump-ilo.

*h.*—bombear, dar a la bomba.
*p.*—dar a la bomba.
*i.* —pompare.
*f.* —pomper.
*a.*—to pump.
*g.*—aus)pumpen.
*pol.*—pompowac.
*sv.*—pumpa.

*Altiri aŭ puŝi likvidaĵon aŭ gason per pumpilo.* —ilo = *Speciala aparato uzanta la maldensigon de la aero por levi fluidaĵon en tubo.*

**Purpuro.**—*Gr.* porphira (*ruĝaĵo*); *l.* purpura.




Vi—Purpuro, heraldike.

*h.*—púrpura.
*p.*—purpura.
*i.* —pórpora.
*f.* —pourpre.
*a.*—rockshell.
*g.*—Purpur.
*pol.*—purpura.

*Ruĝblua koloro, kiel tiu eltirita el speciala konko, laŭ tradicio, rezervita por reĝaj vestaĵoj. Heraldike oni reprezentas ĝin per linioj paralelaj, klinitaj maldekstren.*


**Pupitr**o.—*L.* pulpitum (*pupitro*).



*h.*—pupitre, atril.
*p.*—estante, (pulpito).
*i.* —leggio, pulpito.
*f.* —pupitre.
*a.*—pult.
*g.*—Pult.
*pol.*—pulpit.

*Meblo, ḳies supraĵo estas pli malpli ḳlinita por subteni adeḳvate legotan libron, pentrotan paperon, ḳ. c.* Fiksa—, turnebla—.

**Put**o.—*L.* puteus (*puto*).



*h.*—pozo.
*p.*—poço.
*i.* —pozzo.
*f.* —puit.
*a.*—well.
*g.*—Brunnen, Pütt.

*Diverscela truo elfosita en la tero.* Moura—, arteza—.

**Puzolan**o.—*El* Pozzuoli, *propra nomo de itala regiono, apud Napolo.*

PUZOLANO DE LA REJNO

| | |
|---|---|
| sablo .... | 8,75 % |
| silico .... | 46,25 — |
| alumino... | 20,71 — |
| magnezo.. | 1,00 — |
| peroksido fera.... | 5,48 — |
| kalko..... | 2,15 — |
| akvo...... | 9,25 — |
| aliaĵoj ... | 6,30 — |

*h.*—puzolana.
*p.*—pozzolâna.
*i.*—pozzolana.
*f.*—pouzzolane.
*a.*—puzzolano.
*g.*—Puzzolanerde, Brockeltuft.

*Polvigita, vulḳana materialo, ḳiu hidraŭliḳigas la ḳalḳojn.* Natura—, artefarita—.

# R

**Raboti**.—*El a. g.* ra-bozen (*for puŝi*).




1. Raboti. 2. Rabotilo.

*h.*—cepillar.
*p.*—aplainar.
*i.* —piallare.
*f.* —raboter, aplanir.
*a.*—to plane.
*g.*—hobeln.

*Ebenigi lignon aŭ metalon per tipa, tranĉanta, ilo.* —ilo=*Ilo por raboti.* —aĵo=*Lamenetoj detranĉitaj per rabotilo.*


**Rad**iadilo.—*El l.* radiare (*disĵeti*).



*h.*—radiador.
*p.*—radiador.
*i.* —radiatore.
*f.* —radiateur.
*a.*—radiator.
*g.*—Radiator.

*Aparato konsistanta el metala tubaro por centrigi k. distribui la varmon, kiun ĝi ricevas el kaldrono.*

**Rel**o.—*El l.* regula (*regulilo*).



*h.*—raíl.
*p.*—rail.
*i.* —rail..
*f.* —rail.
*a.*—rail.
*g.*—Schiene.
*pol.*—rels.

*Tipa, profilita ferstango terkuŝanta po du, por faciligi la ruladon de vagonoj, tramoj, k. c.* —vojo=*Fervojo.* —ŝanĝilo.

**Relief**o.—*El l.* relevare (*re levi*).



*h.*—relieve.
*p.*—relevo.
*i.* —rilievo.
*f.* —relief.
*a.*—relief.
*g.*—Relief.
*pol.*—relief.

*Elstaro de io sur ebena surfaco. Elstara skulptaĵo sur ebeno.* Alta—=*Reliefo, kies figuroj pli ol duone super-*

*staras la ebenon.* Meza— =*Reliefo, kies figuroj elstaras la duonon de ilia proporcia dikeco.* Ba— =*Reliefo, kies figuroj elstaras malpli ol la duono de ilia dikeco.*

**Remparo**.—*El b. l.* re-amparare (*ree defendi*).



Remparo ĉina.

*h.*—baluarte.
*p.*—baluarte.
*i.* —baluardo.
*f.* —rempart.
*a.*—rampart.
*g.*—Wall.

*Muro aŭ tera altaĵo antaŭita de fosaĵo k. starigita por defendi lokon, fortikaĵon, urbon.*

**Renesanco**.—*El l.* re nascere (*re naskiĝi*).



Renesanca palaco.

*h.*—renacimiento.
*p.*—renascimento.
*i.* —rinascimento.
*f.*—renaissance.
*a.*—renaissance.
*g.*—Renaissance.
*pol.*—renesans.

*Arta movado disvolviĝinta dum la* 15ª-16ª *jc., bazita sur imitado de la antikva greka arto.*

**Restoracio**. — *El l.* re-staurare (*ree-starigi*).



Restoracio en Nico.

*h.*—restaurante.
*p.*—restaurante.
*i.* —ristorante.
*f.* —restaurant.
*a.*—restaurant, eating-house.
*g.*—Restauration.
*pol.*—restauracja

*Publika manĝejo k. trinkejo per pago.*

**Retablo**.—*L.* retabulum, *el* retro tabularium (*malantaŭa tabularo*).



*h.*—retablo.
*p.*—retabulo.
*i.* —retabulum.
*f.* —retable.
*a.*—retable.
*g.*—Altarblat.

*Ligna aŭ ŝtona verko, ĉe la fono de altaro. La unuaj retabloj de la kristanaj temploj estis porteblaj, de la* 12ª *jc. konstruiĝis fiksaj.*


**Retuŝi**. — *El l.* re + tactum (*ree tuŝi*).



**h.**—retocar.
*p.*—retocar.
*i.* —ritoccare.
*f.* —retoucher.
*a.*—retuch.
*g.*—retouchieren.

*Korekti fotografaĵon, plakon, gravuron, desegnon, pentraĵon.*


**Rigl**ilo.—*El l.* regula (*regulilo*).




*h.*—cerrojo.
*p.*—ferrolho.
*i.* —chiavistello.
*f.* —verrou.
*a.*—bolt.
*g.*—Riegel.
*sv.*—regla.
*pol.*—ryglowac.

*Stango ŝovebla inter kramporingoj por fermi pordon aŭ fenestron.*
—i=*Senmovebligi pordon, fenestron, k. c., per riglilo.*

**Ripar**i.—*L.* reparare, *el* re+parare (*ree prepari, ree novigi*).


Riparota muro.

*h.*—reparar.
*p.*—reparar.
*i.* —riparare.
*f.* —réparer.
*a.*—repair.
*g.*—reparieren.
*pol.*—reperowac.

*Rebonigi malbonstatan konstruaĵon, konstruelementon, k. c.*

**Rokok**o.—*El kelta* rok (*roko*).



*h.*—rococó, rocalla.
*p.*—rococo.
*i.* —roccocó.
*f.* —rococo.
*a.*—rococo.
*g.*—Rokoko.
*pol.*—rokoko.

*Varianto plej stranga de la baroka stilo; varianto de la rokaĵa konstruado, dum la regado de la franca Ludoviko 15ª (1723ª-1750ª j.).*


**Rom**ana (*arto*).—*El propra nomo de la itala ĉefurbo Romo; l.* romano.


Romana arkitekturo.
— skulptarto.

*h.*—romano.
*p.*—romana.
*i.* —romana.
*f.* —romaine.
*a.*—roman.
*g.*—römer, römisch.

*Arto de la romanoj, en la roma imperio, de la 3ª jc. a. K. ĝis la 5ª jc. La arkitekturo estis influata de la greka, sed elvolba k. pli fortika.*
—a arto=*Arto de la urbo Romo.*

**Romanik**a (*arto*). — *El* Roma, *propra nomo de itala ĉefurbo; l.* romanica.


Romanika fenestro.

*h.*—románico.
*p.*—romanico.
*i.* —romanico.
*f.* —roman.
*a.*—romanesque.
*g.*—romanisch.

*Arto romanida, antaŭgotika, disvolviĝinta en Eŭropo dum la 11ª-12ª jc.*

**Rotondo**.—*L*. rotondus, *el* rota (*rado*).



*h*.—rotonda.
*p*.—rotúnda.
*i*. —rotondo.
*f*. —rotonde.
*a*.—rotunda.
*g*.—Rotunde, Rundgebäude.
*pol*.—rotunde.

*Rondoforma konstruaĵo, ofte kun kupolo.*

**Rubo**.—*El gr*. rupos (*malpuraĵo*); *l*. rudera.

*h*.—enruna, escombro.
*p*.—entulho, escombros.
*i*. —ruderi, macerie.
*f*. —décombres, (rouille).
*a*.—rubbish.
*g*.—Müll, Schutt.
*pol*.—gruz.

*Rompitaĵoj el ruinigita, detruita konstruaĵo. Balaaĵo.* —ejo=*Loko por meti la rubojn.* —i=*Formeti rubon.*

**Ruino**.—*L*. ruina, *el ruere* (*fali*).



Ruino de greka templo.

*h*.—ruina.
*p*.—ruina.
*i*. —rovina.
*f*. —ruine.
*a*.—ruins,
*g*.—Ruine.
*pol*.—ruina.


*Disfalinta, detruita, renversita konstruaĵo.* —igi=*Detrui, pereigi ion.* —iĝi=*Iĝi io ruina.*



Ruino de romana triumfarko (Algerio).

# S

**Sablo**.—*L.* sabulum (*sablego, grajnaro*).





S = Sablo.

*h.*—arena, sablon.
*p.*—areia.
*i.* —sabbia.
*f.* —sable.
*a.*—sand.
*g.*—Sand.
*sv.*—sand.

*Materialo konsistanta el tre malgrandaj ŝtonaj grajnoj ne kunigitaj unu kun la alia.* —i = *Meti sablon sur vojo, en...* Mara—, rivera—, mina—, dun—, kvarca—, granita—, kalka—, seka—, natura—, artefarita—, akra—, rondgrajna—.

**Sago**.—*L.* sagitta (*sago*), *el* sagax (*akuta, subtila*).




*h.*—ságita, flecha, montea.
*p.*—setta, sagittária, flecha.
*i.* —saetta, freccia.
*f.*—fléche, (sagette).
*a.*—arrow, sagitta.
*g.*—Pfeil.

*Stangeto pintita ĉe unu ekstremo k. kun plumoj ĉe la alia. Distanco de la bazo ĝis la verto ĉe la arkoj.*

**Sakristio**.—*L.* sacristia, *el* sacra (*sankta*).



*h.*—sacristía.
*p.*—sacristia.
*i.* —sacristia.
*f.* —sacristie.
*a.*—sacristy.
*g.*—Sakristei.
*pol.*—zakrystja.

*Parto de templo, kie oni konservas la objektojn k. vestojn por la diservo.*

**Salono**. — *El g.* Saal, *de* Sal (*loĝejo*).



*h.*—salón, sala.
*p.*—salao, sala.
*i.* —salone, sala.
*f.* —salon, salle.
*a.*—saloon, salon.
*g.*—Salon, Saal.
*pol.*—salon.

*Eleganta ĉambro, ordinare destinata por ricevi vizitantojn.*

**Sarkofago**.—*Gr.* sarkofagos, *el* sarkos + fagos (*karno manĝi*); *l.* sarcophagus.



Sarkofago etruska.

*h.*—sarcófago.
*p.*—sarcophago.
*i.* —sarcofago.
*f.* —sarcophage, cercueil.
*a.*—sarcophagus.
*g.*—Sarkophag, Sarg.
*pol.*—sarkofag.

*Ŝtona ĉerko. Luksa, ŝtona ĉerkoforma monumento.*

**Saturno**.—*Gr.* Kronoso; *l.* Saturnus, *el* satus (*ŝata*).



*h.*—Saturno.
*p.*—Saturno.
*i.* —Saturno.
*f.* —Saturne.
*a.*—Saturn.
*g.*—Saturn.
*pol.*—Saturn.

*Mita, romana dio, filo de Urano (la ĉielo) k. Gea (la tero); li decidis, pro timo esti detronita, engluti siajn filojn, sed sia edzino Cibelea anstataŭis ĵusnaskitojn per ŝtono; tiel savis Jupitron, Neptunon k. Plutonon.*

**Scen**(ej)o.—*Gr.* skene (*kovraĵo*); *l.* scena.



Sceno aerlibera.

*h.*—escenario.
*p.*—cenario.
*i.* —scena.
*f.* —scéne.
*a.*—scene, scenery.
*g.*—Bühne, (Scene).
*pol.*—scenie.

*Loko, kie ludas aktorojn.* Pro— = *Antaŭscenejo.* Epi— = *Surescenejo.* Post— = *Malantaŭscenejo.* —grafio = *Arto ornami, dekoracii la scenon.*

**Sceptr**o.—*Gr.* skeptron (*sceptro*); *l.* sceptrum.




*h.*—cetro.
*p.*—sceptro, cetro.
*i.* —scettro.
*f.* —sceptre.
*a.*—scettro.
*g.*—Zepter.

*Luksa, valora bastono, arte prilaborita, uzata de regnestroj kiel signo de ilia indeco.*

**Seg**i.—*El l.* secare, serrare (*tranĉi*).




Segi tubon.
S = Seg-ilo.

*h.*—serrar.
*p.*—serrar.
*i.* —segare.
*f.* —scier.
*a.*—saw, shed.
*g.*—Sägen.

*Tranĉi lignon, k. a., per dentita, ŝtala*

*lameno.* —ilo=*Ŝtala, dentata rubando por distranĉi.*

**Seĝo**.—*L.* sedes, *el* sedere (*sidi*).





1. Seĝo ; 2. Brakseĝo.

*h.*—silla.
*p.*—sella, cadeira.
*i.*—sella, sedia, sede, seggio.
*f.*—siège, chaisse.
*a.*—seat, seddle, chair.
*g.*—Stuhl, Sessel.

*Meblo por sidi.* Lul—, apog—, brak—, infan—, faldebla—... ; —eto, —aro.


**Sekcio**. — *L.* sectio, *el* secare (*sekcii*).



Sekcio de frigidario en pompeja domo.

*h.*—sección.
*p.*—secçao.
*i.* —sezione.
*f.* —section.
*a.*—section.
*g.*—Schnitt.
*pol.*—sekcja.

*Desegno de imagata tranĉo tra konstruaĵo, tereno, objekto, k. c.* Laŭlonga—, laŭlarĝa—, laŭ A-B—...



Sekcio de la Avenuo de la Kampoj Elizeaj. (Parizo).

**Serajlo**. — *Ar.* serai (*palaco*) ; *l.* serraculum, *el* sera (*fermita*).




Serajla sceno.

*h.*—serrallo.
*p.*—serralho.
*i.* —serraglio.
*f.* —sérrail.
*a.*—seraglio.
*g.*—Serail.
*pol.*—seraj.

*Parto de la arabaj palacoj, kie loĝas la virinoj.* Karavan—=*Granda gastejo por la orientaj karavanoj.*

**Seruro**.—*El l.* sera, serare (*fermi*).




1. Serura prenilo.
2. — ŝildeto.
3. — klinko.
4. — riglilo.

*h.*—cerradura.
*p.*—fechadura.
*i.*—serratura, serrame.
*f.*—serrure.
*a.*—lock.
*g.*—Schloss.

*Risorta aparato por fermefiksi pordon.* Pend—=*Pendanta, portebla seruro.* —i=*Fermi per seruro.* —isto, —kesto, —truo, —ŝildo, —riglilo...

**Sfinks**o.—*Gr.* sfinks ; *l.* sphinx.





1. Sfinkso egipta.
2. — romana.

*h.*—esfinge.
*p.*—esfinge.
*i.* —sfinge.
*f.* —sphinx.
*a.*—sphinx.
*g.*—Sphinx.
*pol.*—sfinks.

*Fabela, flugilhava besto, de la antikvaj egiptanoj, kun leona korpo k. homa kapo; simbolo de la forto kun la inteligento.* Andro— = *Sfinkso kun vira kapo.*

**Sfum**i. — *El l.* ex + fumo (*de fumo*).




Sfum-ilo.

*h.*—esfumar.
*p.*—esfumar.
*i.*—sfummare.
*f.*—effumer, estomper.
*a.*—sfumato.
*g.*—stompieren, (sfumata).

*Malintensigi pograde, ĉe desegno aŭ tuĉo, la naturan nigron de karbo, krajono, inko, k. c. Fari la samon rilate aliajn kolorilojn.*


**Sgraf**ito. — *El gr.* grafeion (*grifelo*) ; *l.* graphium.



*h.*—esgrafito.
*p.*—esgraffito.
*i.* —sgraffito.
*f.* —sgraffite.
*a.*—sgraffito.
*g.*—Sgraffito.

*Gravurita ebena ornamo, kun ebena fono ofte kolorigita.* —i = *Fari ebenan reliefon.* —ilo, —isto, —aĵo, —ado.

**Sifon**o.—*Gr.* sifon (*sifono*) ; *l.* sipho, siphonis.





1. Subvoja sifono.
2. Vitra —
3. Tuba —

*h.*—sifón.
*p.*—siphao.
*i.* —sifone.
*f.* —siphon.
*a.*—siphon.
*g.*—Siphon.
*pol.*—syfon.

*Tubo kurvigita, dubranĉa; konstruaĵo similforma. Botelo kun tia tubo.*

**Signo**.—*L.* signum, signo (*signo*).



Signoj internaciaj por ŝtratoj k. ŝoseoj, laŭ Ĝeneva trafiko-konferenco.

*h.*—signo.
*p.*—signo.
*i.* —segno.
*f.* —signe.
*a.*—sign, mark.
*g.*—Zeichen.
*pol.*—znak, (sygnal).

*Io ajn perceptebla (streko, desegnaĵo, figuro, bildo, objekto, gesto), kiu elvokas en la spirito ideon pri alia afero; ekstera distingilo.* —i = *Distingigi iun aŭ ion per signo.* Algebra—, topografia—, astronomia—...

**Sigelo**.—*Gr.* siglai (*cifero*); *l.* sigillum (*marko*).



Sigelo vaksa.

*h.*—sigilo, sello.
*p.*—sigillo, sello.
*i.* —sigillo.
